LA FERVOJISTO

ITALA FERVOJISTA
ESPERANTISTA ASOCIO

A. I. F. E.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Dopolavoro Ferroviario - Via XX Settembre, 17
VERONA (Italia)

INFORMA BULTENO

Nº I = JANUARO I953a

JARA RAPORTO = I952

Ĉiu Asocio kutimas je ĉiu komenciĝo de nova jaro, rigardi la aktivecon disvolvita de ĝi dum la ĵus finiĝinta jaro por deduki notojn kaj ciferojn montrantaj tiun disvolvon.

Tiel rerigardante la disvolvitan aktivecon okazinta en la jaro I952, ni kontentige konstatas daŭran plibonigon de tiuj koraj, intimaj rilatoj inter la membroj, kiuj ilin alproksimigas kaj al=ligas ĉiam pli forte al ilia Asocio por ke ĝi estu ĝuste taksata pro laseriozeco kaj graveco de ĝiaj laboro kaj celoj.

Estas pro tio ke ĉiu membro klopodis kiel eble plej bone por la disvolvo de la Asocio, tiom ke ekde la 2a nia Nacia Kongreso ĝis la I952a jarfino, la nombro de ĝiaj membroj plimultiĝis je 25%.

Ĉi tiu plimultiĝo estas konsoliga se oni konsideras ke la nom=bro de la aliĝintoj estas certa montrilo pri la progresado de A=socio kiel la nia, kiu celas envicigi en siaj vicoj la plej gran dan membron de fervojistoj, por instrui al ili helpan lingvon kompreneblan al ĉiuj kolegoj de ĉiu lando, celante igi pli prak=tikan, pli facilan ilian delikatan, pezan laboro.

Nia nova restarigita AIFE en tiel malmulte da tempo sukcesis konvinki kelkajn skeptikulojn, ĝi sukcesis revenigi al si la izo litajn amikojn, kiujn estis disigitaj pro la lasta milito.

Tamen estas vere ke ne estis reenirintaj ĉiuj la malnovaj e=sperantistajn amikojn fervojistajn el Genova, Varazze, Voghera, Milano, Vicenza, Padova, Trieste, Firenze, Pisa, Napoli, Caglia=ri k.t.p. sed ni estas konvinkitaj, ke post la jarraporto, kiun ni faros je la unuaj tagoj de la venonta jaro, ĉi tiuj malnovaj a mikoj estos ĉiuj kun ni, kaj kunigitaj, ni laboros kune ligitaj per unu sola volo, t.e. superi la ĉiujspecajn malfacilaĵojn, kiu malhelpas pli rapidan disvastiĝon de Esperanto.

Ni ne povas fini ĉi tiun mallongan raporton sen turni nian ri gardon al nia Bulteno, kiu de post pli malmulte el unu jaro, pli kreskiĝis kaj ĝi pliboniĝos ankaŭ tipografe se la nombro de kun=laborantoj akceptante nian alvekon, iom post iom plinombriĝos.

Al ĉiuj kunlaborantoj, inklusive nia samideano J.Lok, al ĉiuj Esperanto-instruistoj, al ĉiuj sekretarioj de esperantistaj gru=poj disseminitaj en la diversaj fervojaj centroj, al ĉiuj nia i=zolitaj membroj, al niaj Esperantaj fervojistaj amikoj, kiuj est as ankoraŭ for en niaj vicoj, alvenu nian saluton kaj nian dank=on pro la aktiveco kiun ili disvolvis pasintjaro, kaj bondeziron je fruktodona laboro por la nova jaro ĵus komenciĝinta.

LA ĈEFESTRARO de A.I.F.E.

5a I.F.E.F. - KONGRESO (5-IO/5 I953)

en UTRECHT = NEDERLANDO

Komuniko de la L.K.K.

Al tiuj anoj, kiuj ne povos viziti la 5an IFEF-KONGRESON sed tamen deziras ĝin substeni, L.K.K. donas la eblon esti simpatiantaj kongresanoj po unu nederlanda guldeno. Tuj post la kongreso vi ricevos la kongreslibron kaj kongresinsignon.

Vi ankaŭ plenigu la aliĝilon kaj sendu la monon rekte al LKK.-kasisto aŭ al la landavojaĝgvidanto. Kiam vi subtenas nin, vi multe kontribuas al la sukceso de la jubilea kongreso.

PROVIZORA PROGRAMO

MARDO 5/5 - Akcepto de la kongresanoj. Akceptejo malfermita je 9a h.
IO - I2 h. : Delegitar - kaj estrarkunveno.
I3.30-I5.30 : Delegitar - Kaj estrarkunveno.
I5.30-I7.= : Kunveno de la Terminara komitato.
I9.30 : Interfratiĝa vespero. (programo ne fiksita).

MERKREDO 6/5
IO.= h. : Kunveno malantaŭ la tria ĉefadministraciejo.
IO.I5 h. : Metado de florkrono ĉe la fervoja monumento.
IO.30 h. : Fotografado de la kongresanoj kaj transdono de la jubilea donaco al la IFEF-estraro antaŭ la tria ĉefadministraciejo.
I3.30 h. : Ekskurso kun faka prelego al Werkspoor (vagonarfabriko) (Nur 50 personoj povos partopreni).
I4.30 h. : Fakaj prelegoj.
20.= h. : Solena malferno de la kongreso. Alparolos nin i.a. la plej altrangulo de la Nederlanda Fervoja Kompanio kaj la urbestro.

JAUDO 7/5 =
IO - I2 h. : Laborkunsido.
I4 - I7 h. : Laborkunsido.
IO - I6 h. : Ekskursoj nur por inoj neesperantistaj=vidu aliĝilon=
20.= h. : Opera koncerto de fervoja ĥoro.

VENDREDO 8/5 =
Tuttaga ekskurso tra Nederlando per vagonaro, aŭtobusoj kaj ŝipo.

SABATO 9/5
IO - I2 h. : Laborkunsido.
I4.= h. : Se necese laborkunsido, poste filmo "5 Jaroj IFEF-Kongresoj.
I9.30 h. : Kabaredo vespero prizorgata de fervojaj artistoj.

DIMANCO IO/5 =
Post - kongresa tago al Nijmengen vagonaro. Mallonga promenado tra la urbo, kaj aŭtobusa veturado en la ĉirkaŭaĵoj sekvos.

Ĉiuj aranĝoj, ĉe kiuj ne estas menciita alia loko, okazos en la sindikata domo: N.V. -Huis, Oudegracht 245, UTRECHT.
Dum la kongreso ĝi ankaŭ estas la poŝta adreso.
Kongresanoj alvenantaj jam la 4an de majo anoncu sin en la provizora akceptejo sur la unua kajo de la Utrechta stacidomo.
Venu grandnombre al Utrecht, por ke la jubilea kongreso estu sukceso!!!

K. BROUWER, Sekretario de la L.K.K.

=%=%=%=%=%=%=%=%=%=

KUN LEVITA KAPO, ANTAŬEN!

"Nia internacia sekretario, kolega J.LOK, la pasinta monato, sen dis al ni tiun ĉi artikolon, kiu alvenis nin malfrue.

Tamen ni kredas utilan aferon publikigi ĝin, hodiaŭ, ankaŭ se la jarsanĝo estis okazinta, ke la artikolo estas ankoraŭ utila kaj unueca."

Estas ĉiujara revenanta okazintaĵo kiam ni en la hejmaj rondoj dum la jarŝanĝiĝo, ĵetas rigardon malantaŭen en la pasinton.

En kelkaj minuotj, jes kelkaj sekundoj, la travivaĵoj en la pasinta jaro traflugas niajn cerbojn kaj kaŭzas al ni ĝojon aŭ doloron.

La rapideco de la pensoj estas nemezurebla. Pensante pri la feliĉo aŭ doloro en familia rondo oni en la sama momento ne povas bridi la pensoj, kiuj fulmrapide daurigas sian vojon trans limoj kaj oceanoj al amataj gekonatuloj loĝantaj tre malproksime de la rispektiva loko de la pensanto. Dum kelksekunda momento la pensoj cirkuladas tra la tuta mondo por rememorigi tiujn, kiujnla morto forprenis de ni kaj deziri ĉian bonan al tiuj, kun kiuj ni spirite estas interligitaj.

Tion longan cirkuladon ne bezonas fari la pensoj de ĉiu homo, kies horizonto etendiĝas ĝis la urbo, provinco aŭ landlimoj. La Esperantistoj ne havas limigitan horizonton dank'al nia komuna lingvo kaj niaj sentoj de amikeco kaj dankemeco eniras la mondon en ĉiujn direktojn en momento, kia estas la jarŝanĝiĝo.

En Esperanto ni, kiel esperantistoj, kvazaŭ vivas per unu animo en multaj korpoj. Reciproka estas lapartopreno en ĝojo kaj doloro en la solena momento de la jarŝnĝiĝo ĉar multnombraj estas la ekzemploj, ke nia lingvo estas fenomeno rilate al interfratigo de la homoj.

Ni tamen turnu nian atenton al nia movado kaj precipre la fervojista.

Sendube la opinioj estos diversaj ĉar tio, kio al unu ŝajnas grava, al alia ŝajnas negrava aŭ tute malgrava. Ofte estas malfacile diri kio alportis sukceson aŭ malsukceson, ĉar volonte ni rigardas la situacion tra propraj okulvitroj. Tio estas bona kaj necesa sed en nia movado oni ne pririgardu la situacion el nacia vidpunkto sed el internacia, almenaŭ tiusence, ke ne bone floranta movado en iu lando respeguligas la staton de la movado internacia. Nia movado estas tre sentema pro la sociaj cirkonstancoj kaj la trankvilo aŭ maltrankvilo en la mondo. Tio tamen ne estu kialo por senilluziiĝi, kontraŭe, tio estu por ni stimulo por pligrandigi la aktivecon. Post kelkaj semajnoj ankaŭ IFEF faros la bilancon pri la Jaro I952a kaj tutcerte povos mencii kreskon de la membronombro.

Tiu kresko ne estos tiom impona kiel pasintjare kaj estos inter ni pesimistoj, kiuj vidas en tio simptomojn de iom post iome pli=malfacilĝanta batalo por la realigo de nia komuna idealo. Tute senbaza la pesimismo ne estos precipe tial ke la informoj pri la nombro da kursanoj en kelkajlandoj ne estas esperigaj.

Ni ne ŝatas sekvi strutan politikon sed preferas doni ekzaktajn ciferojn kaj mencii la verajn faktojn.

En la jaro I953a IFEF festos sian unuan jubileon, nome la kvinjaran, kaj la kvina IFEF-kongreso okazos tri monatajn antaŭ la oficiala dato.

./.

Naskiĝinta en detruita mondo, IFEF sorĉis sian vojon inter la postrestintaj ruinoj kaj tra la rubaĵoj de la lasta mondmilito. La homhontigan aspekton ni ne facile forgesos kaj des pli necese estas streĉi la fortojn por eviti similan katastrofon. Nia vojo estas dekliva kaj kondukas supren al la supro sur kiu ni volas fiksi la brulantan torĉon de nia idealismo.

Ju pli oni progresas sur tiu vojo, des pli malfacile fariĝos la antaŭenirado. Nia majstro, D-ro Zamenhof, ekbruligis la torĉon pro porti ĝin kaj ni, la adeptoj, laŭvice transprenu la torĉon por porti ĝin al la finfine celo.

Konstanta sengrada kresko ĉiujare estas nur modesta deziro ĉar por ĉiu sukceso ni devos batali per niaj disponeblaj fortoj. Nerefutable estas, ke ankaŭ en 1952 ni faris paŝeton antaŭen.

Kiam ĉiuj gekolegoj en la solena momento de la jarŝanĝiĝo decidos nur iomete pli grandigi sian aktivecon por nia afero, tian ankaŭ en la nova jaro sukceso estos garantiata. Ne eksistas kialo por esti pesimistaj ĉe se la sukceso atingita ne estis okulfrapa, tio estas kvazaŭ, aŭ fakte devas esti, da mezurilo de nia aktiveco kaj averto por pligrandigi ĝin.

Se nia gekolegaro sekvu la evoluonon nia movado kun granda intereso kaj ĉerpu al tio la necesan forton por la bono de nia movado esperantista.

Dezirante al ĉiuj gekolegoj agrablan kristnaskon, ni esprimas la esperon, ke la novan jaron alportu al ĉiuj freŝan kuraĝon kaj ardan sopiron batali por la realigo de nia idealo. Tiam ni povas eniri la novan jaron kun levitaj kapoj antaŭen al novaj kaj pli grandaj sukcesoj !

J. LOK

=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=

EL ESPERANTAJ PROZAĴOJ

MALGRANDA TAMBURISTO

En milito kontraŭ Francujo dekkvinjara angla tamburisto, kiu tro proksimiĝis al la franka linjo, estis kaptita kaj kondukita al la franca generalo. Kiam la lasta demandis lin, kiu li estas, li respondis: "Angla tamburisto".

Ĉar oni tion ne kredis, oni donis al li tamburon kaj ordonis bati kelke da marŝoj; la knabo tion faris. Tamen la suspekto de la generala daŭris ankoraŭ, kaj li ordonis al la tamburisto bati la returnan marŝon. "Returnan marŝon? - demandis la juna anglo mi ne sciàs kio ĝi estas." La respondo tiel plaĉis al la franca oficiro, ke li ellasis lin kaj skribis al lia generalo por laŭdi kian bravan konduton.

NAIVECO

Knabino sesjara havis katon kaj pupon. Ju demandis ŝin, kiun la du ŝi preferas.

Ŝi ne volis respondi, fine ŝi diras en la orelo:
"Mi preferas mian katon, sed ne diru, mi petas vin, tion al mia pupo

=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=%=

./.

VITA de "A.I.F.E.

Brevi note

Mentre si osserva un continuo progresso nello sviluppo della nostra Associazione, come risulta dalla "Rassegna 1952" dell'AIFE, pubblicata nella Ia pagina di questo Bollettino, tuttavia si nota che questo sviluppo va a zone e non si ripercuote in eguale misura in ogni zona. In questo momento si segnalano le zone di BENEVENTO, BOLOGNA e VERONA. Anche UDINE deve essere segnalata per un continuo, progressivo sviluppo, ma dove maggiore è l'attività diffusiva dell'Esperanto sono le tre prime località, come si rileva dalle corrispondenze che ci arrivano e che in brevi riassunti vengono pubblicate.
E' strano p.e. che dove pure si svolge buona attività propagandistica e positiva, come istituzione di corsi, conveni settimanali etc. come a PISA ed a TRIESTE, la nostra Associazione non progredisce. Abbiamo buone previsioni per i prossimi mesi per queste due ultime località e noi attendiamo con certosina pazienza che le previsioni si maturino con buoni frutti.
Anche Genova presto entrerà a far parte della nostra famiglia... ed il cammino prosegue. Arrivederci al prossimo mese.

C. C.

VITA dei GRUPPI

PISA

Ogni mercoledì alle ore 2I, presso la sede di quel D.L.F. continuano le riunioni dei ferrovieri esperantisti, che vi svolgono conversazioni in esperanto, allo scopo di perfezionarsi nella lingua parlata. Ogni Venerdì invece, alle ore 2I, nella stessa sede si tiene un corso di Esperanto, da parte di uno studente di ingegneria. Il corso è molto frequentato.

BOLOGNA

Hanno vita due corsi distinti di Esperanto. Il primo presso la Scuola Professionale della Sezione Movimento a cura del G.F.E. con frequenze di 43 studenti, che si presenteranno tutti agli esami, presso speciale Commissione, nella prima quindicina di Aprile. Il secondo corso si svolge in un'aula del Liceo Minghetti, a cura del Gruppo "Tellini" con frequenze di 39 studenti, che pure si presenteranno agli esami, unitamente ai ferrovieri, nei primi del prossimo Aprile. Insegnante apprezzato di entrambi i corsi, il nostro Presidente Sig. G. ZACCONI.
Il mercoledì di ogni settimana, alle ore 2I, nella sede del DLF. in Piazza Calderini 4, ha luogo nel "Renkontejo" la "Semajna vespero" che si protrae sino alle ore 23, dove intervengono gli esperantisti, ferrovieri e non, in cordialità di rapporti.

VERONA

Continua con assiduità di presenze, malgrado la inclemenza del tempo, il corso di Esperanto. E' un segno positivo che una volta vinto lo scetticismo diffuso per mancanza di conoscenza delle possibilità offerte dall'Esperanto, esso convince e avvince e raramente viene abbandonato.

./.

Il G.F.E. di Verona, ha rallentata la sua attività a causa di malattie stagionali che ha preso la famiglia del suo Segretario Sig. MAZZI. All'egregio amico e samideano, vada l'augurio affettuoso dei samideani veronesi, per un pronto ristabilimento in salute dei suoi famigliari.

MEMENTO

il cassiere dell'AIFE comunica che 3/4 dei soci hanno rinnovato la iscrizione per l'anno in corso, versando l'importo delle quote stabilite dallo Statuto e dalle delibere del C.D.= Dovendo a nostra volta regolare la contabilità con le Associazioni cui siamo legati a termini dello Statuto, preghiamo i nostri soci, che non si sono messi ancora al corrente, di volerlo fare al più presto.

=%=%=%=%=%=%=%=%=

ESPERANTISTA RADIOPROGRAMO

LUNDE	: h. 23.I5 - 23.40	Hilversum	298 kaj I88 m.	(ĉiun duan lundon)
MARDE	: h. 8.45 - 9.00	Lille	295 m.	
	: h. I2.55 - I3.00	Bern	48.66 /3I.46 / I6.87 m.	
	: h. I6.00 - I6.I5	Wien	203 /25.00 / 30.00 / 4I.48	
	: h. I8.35 - I8.40	Bern	48.66 / 3I.46/ I6.87 m.	
MERKREDE	;h. I6.45 - I7.00	Graz	4I7.2 m.	(ĉiun duan merkredon)
	: h. I9.00 - I9.20	ROMA	25.2I / 3I.35 / 49/92	
	: h. 20.30 - 2I.00	Madrid	225.00 / 42.35 m.	
	: h. 22.35 - 22.40	Wien	5I3.00 / 25.46 / 48.74 m.	
ĴAUDE	: h. 9.30 - 9.45	Paris	348.00 m.	
	: h. I2.55 - I3.00	Bern	48.66 / 3I.46 / I6.87 m.	
	: h. I8.35 - I8.40	Bern	48.66 / 3I.46 / I6.87 m.	
VENDREDE	: h. I9.00 - I9.20	ROMA	25.2I / 3I.35 / 49.92 m.	
	: h. 23.30 - 23.40	Hilversum	298 kaj I88 m.	
SABATE	: h. 9.30 - I0.00	Rio de Janeiro	375 kaj 30.7I m.	
	: h. 23.I5 - 23.30	Hilversum	298.00 m.	

=&=&=&=&=&=&=&=&=

RICEVITAJ

ĝis ĉimonato el Eksterlandaj Fervojistaj Asocioj:
BULTENO = organo de I.F.E.F. = Amsterdam
BULTENO = organo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
BULTENO = organo de Dana Esperanta Fervojista Asocio
BULTENO = organo de Belga Esperanta Fervojista Asocio
FERVOJISTO = organo de Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda
FERVOJISTO = organo de Franca Fervojista Esperanto-Asocio
ni ricevis ankoraŭ:
SENNACIULO = organo de S.A.T.
INTERSTENA INFORMILO kaj STENOGRAFIO
VERDA STELETO = Monata informilo de "Centra Esperanto" Torino
NOTIZIARIO INTERNAZIONALE = Torino

=%=%=%=%=%=%=%=%=

fino

Ni fervojistoj kaj Esperanto -

Estas la unua fojo ke mi verkas kelkajn liniojn en tiu ĉi Bulteno kaj,kiel Prezidanto de la A.I.F.E.,mi fieras kaj ĝojas sendi al ĉiuj gekolegoj de la vasta I.F.E.F.,miajn respektplenajn salutojn,tutkorajn bondezirojn en la komenco de la jaro 1953.

La verda stelo indikunu ni la vojon por atingi kiel eble plej baldaŭ nian tre deziratan celon.

La jaro 1953 , por ni fervojistoj aspektas tre interesa kaj serioza ; nia afero kreskas bonege,nia laboro donas al nia kara movado bonajn fruktojn kaj mi estas certa kaj mi fidas ke espero ne estos vana ,ke fine la celo ne estas tro malproksima.

GEKOLEGOJ! Ni devas klopodi ni devas streĉi niajn kapablecojn niajn fortojn,kune ,ame,kaj zorge, por proksimigi pli kaj pli niajn dezirojn por atingi la eglecon malpermesi,malhelpi,eviti kia ajn konflikton inter la popoloj kiuj en si mem neniam deziris , deziras ,kaj dezires militon.

Same kiel la suno malaperigas la ŝimaĵon , amo boneco kaj vero devas malaperigi malluman , dubon , malamon, miskomprenon,malveron. - Jen niajn armilojn. - Ni estas antaŭ ĉio esperantistoj.!

" NE AL GLAVO SANGON SCIFANTA ....."

Ni esperantistoj kaj precipe ni fervojistoj havas specialan rolon,tute specialan profesion tute specialan eblecon. - Mi legis jam en " Bulteno G.E.F.A. (Germana Esperanta Fervojista Asocio) nº. 2 decembro 1952, kaj mi plene kaj entuziasme aprobas, artikolon kiu skribis S-ro RUMMEL tradukita de S-ro GIESNER.

Ĝia titolo estas "NI FERVOJISTOJ KAJ ESPERANTO. "

Kompreneble la plej parto de la italaj fervojistoj ne havas eblecon legi tiun artikolon ĉar de la germanaj Bultenoj ,estas senditaj al Italujo malmulte de kopioj kaj mi tre volonte deziras sciigi al ĉiuj italaj Fervojistoj Esperantistoj la taŭgan spiriton enhavatan en ĝi kun la certeco utiligi al niaj A.I.F.Eanoj.

Jen la tutan artikolon :

" NI FERVOJISTOJ KAJ ESPERANTO.

Ni fervojistoj havas tute specialan profesion . - Niaj "fervojaj linioj " ne haltas antaŭ la landlimoj,niaj trajnoj rulas trans la tutan kontinenton. - Ĉu jam ĉiam ? Ne,ĉe komence de la pasinta jarcento la doganaj baroj = roj disigis Germanion kiel hodiaŭ, ili distrancas Eŭropon. - Ekzistis nek unueca mono en Germanio, nek unueca tempokalkulon. - La sennombraj malgrandaj Ŝtatoj nomis unu la alian " eksterlando " . - Dum la konstruepoko de la germanaj fervojaj linioj la obstina, malvasthorizonta politiko de multaj germanaj komunumoj kaj registaroj ludis fatalan rolon, kies sekvojn eĉ nun sentas. - Vojaĝoj estis la privilegio de nur malmultaj homoj,sed la antaŭvidintaj viroj,kiu grandstile planis, kies ideoj antaŭflugis iliian tempon , estis insultitaj kiel fantaziuloj.- Hodiaŭ estas memkompreneble,vojaĝi de Hamburg al München sen formalaĵoj,tiam tio ŝajnis kiel utopio. - Tamen, ĉu nia hodiaŭa situacio ne ege similas la tiaman ? - Ni Esperantistoj, kiuj kutimas pensi trans limojn, ĉie vidas nacian egoismon,monajnkaj ekonomiajn regionojn , izolantaj sin kontraŭ la najbarojn, ĉie limojn, ĉikanojn, malfacilaĵojn. Sed ni rimarkas kromnan malhelpaĵon, nome la multnombrajn lingvojn. - Kelkaj el niaj internaciaj trajnoj traveturas tri aŭ kvar diverslingvajn landojn. - EĈu ne estas ridinda afero ,observi homojn malsame parolantajn, tiuj provas balbute interkompreniĝi ? - Kiel ofte oni eraras, miskomprenas.

Sed la internacia lingvo estas eminenta rimedo por kompreniĝi sin sen obstakloj kun eksterlandaj kolegoj kaj vojaĝantoj. - Tiamaniere oni ne bezonas interpretiston,oni ne perdas tempon, ĉiu ekzakte komprenas, kion la alian volas

En tiu ĉi artikolo ni ne traktu la simplajn strukturon kaj lerneblecon de Esperanto. - Ni nur konstatu, ke al la fervojistoj kun iliaj popolligantaj fervojoj mankas interliganta lingvo. - Ne povas esti lingvo,donante privilegional iu popolo, do nek la germana, nek la angla, nek la franca, nek la hispana lingvoj - Sed per Esperanto ni havas tiun lingvon. - Ni memoru nian KVARAN IFEF KONGRESON en LINDAU4, kie 450 gekolegoj el 11 landoj estis ligitaj per Esperanto, sovere laborintaj kaj gaje festintaj. - Tiu vivanta ligilo inter ĉiuj popoloj neniam povas estŭ alia lingvo ol Esperanto.

Ni fervojistoj jam ĉiam estis antaŭbatalantoj por la popolinterligo. - Ankaŭ nun ni estu la avangardo. - La genera= la pionira laboro ja antaŭlonga tempo estis farita, kaj sen la oferoj kaj sen la idealismo de la jamaj gesamideanoj, inter ili sufiĉe da fervojistoj, ni ne estus tie kie ni fakte estas nun. - Sed du mondmilitoj kaj malpermesoj en kelkaj landoj eksterordinare malhelpis la disvastigon kaj evoluon de nia lingvo.

Ni preskaŭ devas komenci de nove. -Ree ni devas oferi kaj esti idealistoj, ĉar la celo ankoraŭ estas malproksima.- Ni vidu ĉi tiun celon : ESPERANTO, la frata lingvo por la tuta homaro, por ke ĉiuj homoj interkompreniĝas sin reciproke. - TIU ESTU NIA KONTRIBUO POR LA PACO - Tiel kiel profesia laboro de la fervojistoj estas vere paca, tiel ni krono ĝin, ne nur lernante Esperanton, sed ankaŭ aplikante nian lingvon laŭ la senco kaj ideo de ĝia kreinto. -

Tio ne nur postulas de ni lipan konfeson, sed daŭran gravan, seriozan laboron. -

Se ni lernas iu ajn alian fremdan lingvon, ni nur faras tion por ni mem.- Lerni Esperanto estas pli : Certe, unue ni lernas ĝin pro nia propra profito, sed krome pro la interna ideo de tiu ĉi lingvo. - Ĉiu nova Esperantisto pligrandigas la amason de tiuj homojn, kiu antaŭĉiu batas humanecon kaj spiritan liberecon. - Sekve, vere Esperantisto neniam misuzas nian lingvon; ne ekzistas por ili egoismo nek interesoj de iuj lokaj, nacia aŭ politikaj grupoj.

GEKOLEGOJ ! NI ESTU PIONIROJ ! LERNU , KORESPONDU , VIZITU KAJ INVITU VIAJN EKSTERLANDAJN GEAMIKOJN. - Instruu nian lingvon al viaj infanoj kaj ankaŭ korespondigu ilin. - Uzu la Esperanton en familia rondo kiel duan lingvon. Varbu ĉiam kaj ĉie por ke la nombro de la gesamideanoj kresku, por ke iutage nia internacia lingvo vere estu la dua en Germanio, en Eŭropo, en la mondo. - Antaŭ cent jaroj niaj praavoj konstatis, vojaĝante tra Germanio per la rapida trafiko, la trajnoj, ke en sudo kaj nordo, en oriento kaj okcidento eksistis germanoj sentitaj kaj pensintaj kiel ili mem. - Tiamaniere ankaŭ ni ekkonos, ke ĉie en la mondo vivas homoj, kiuj kiel ni sentas ĝojon kaj ĉagrenon.

Ni respektos ilin, ĉar ni komprenos ilin. RESPEKTO KAJ KOMPRENO ESTAS LA VOJO AL LA PACO . """

Per tiu ĉi simplaj kaj, taŭgaj vortoj ni povas bone konstati ke la progreson ne haltis kaj tamen bedaŭrinde ne tro frue ĝi kuris. - Ni devas rapidigi la atingonde nia Sankta movado ; plene kaj fervore ni devas labori por ĝi ; neniam ni devas forgesi la terurajn suferojn de la tuta mondo pro la adomenaj militoj kausataj unike pro miskomprno malamo, egoismo, ŝovinismo, perforteco, k.t.p.

Oni nomas nin ne realaj homoj. ! - Ni forte kaj korege asertas, ke tiu ĉi vortoj estas frukto de malbono, obskurantismo kaj precipe de malklereco. - Post longa vico da bataladoj kaj suferoj ni Esperantistoj atingos la celon sed estas necese : VOLON, VOLON, VOLON, koron, konsciencon, ofera honestecon uzotaj sen malamo, sen egoismo, energie senlace. - Per ĉi tiujarmeloj per fortega volo la homaro, kiu estas la popolo de la tuta mondo, povos malaperigi kiaajn danĝerojn nur kondiĉe ke niaj agoj estu unue honestaj kaj nia voĉo fariĝu tondra per multnombra da anoj.

Nia afero iros ĉiam antaŭen, malgraŭ ke ni havas ankoraŭ nur tre malgrandaj rimedojn kaj malgraŭ la praktika kutimo de la plej multo da homoj blinde boji kaj moki ĉiun novan ideon anstataŭ ĝin ekkoni kaj subteni.

Niaj esperoj estas bonaj, niaj fortoj ne laciĝos kaj ni ne ĉesos energie laboradi por nia kara afero, ĝis la bela revo pri neŭtrala ĉiuhoma lingvo efektiviĝos en ĝia tuta pleneco. - NI LABORCS KAJ ESPEROS. - GEKOLEGOJ AL LA VENKO.!

(La Prezidanto : G.Zacconi)

RENKONTEJO DE LA FERVOJISTOJ EL B O L O G N A.

Ĉiu merkredo vespere de la 21a ĝis la 23a h., neprekaj regule okasas en salono ĉe "DOPOLAVORO FERROVIARIO PIAZZA CALDERINI nº. 4- la etaĝo, telefº 21476, RENKONTO - KONVERSACIO inter la A.I.F.Eanoj kaj familianoj el Bologna. Ĉiu vizito estos agrabla !

(el la " LA PRAKTIKO)

L A H O M A R O M E M O R U.....

Ĉiu homo en la mondo devas scii, konstanto memori kaj neniam forgesi, kiom kostis la dua mond milito (laŭ la INTERNACIA REVUO PRI DIPLOMATAJ KAJ POLITIKAJ SCIENCOJ eldonata en Ĝenevo) :

Pli ol 32.000.000 da junaj viroj en la florado de sia vivo mortis sur la batalkampoj. - 15 ĝis 20 milionoj da virinoj, maljunuloj kaj infanoj pereis sekve de bomboj jetitaj.

Pli ol 26.000.000 da homoj estis murdataj en la koncentrejoj. - 29.500.000 personoj vundiĝis aŭ perdis la laborkapablon. - 21.245.000 personoj perdis sian heimon kaj siajn havaĵojn sekve de la elaeraj bombadoj. - Ĉirkaŭ 45 milionoj da personoj estis amase forsendataj aŭ estis aŭ estas ankorau en malliberejo, en punekzilejo for de sia naskiĝlando je miloj da kilometroj.

30.000.000 da loĝejoj estis ruinigataj. - 150.000.000 da personoj estas sen rifuĝejo kaj suferantaj pro malsano.

1000.000 el la infanoj ne havas plu gepatroj.

1.000.000 el la gepatroj ne havas plu siajn infanojn.

45 ĝis 50 milionoj da personoj havas nenion plu, nek profesion, nek familion.

La dua mondmilito kostis ĝis 1945 trioble pli, ol la unua mondmilito, nome : 375 MILIARDOJN DA ORAJ DOLAROJ, kio egalas 10.000 MILIARDOJN DA NUNTEMPAJ DOLAROJ.

Per tiu ĉi sumo oni estas povinta donaci al ĉiu familio en Usono, Kanado, Aŭstralio, Britujo, Irlando, Francujo, Germanujo, Rusujo, kaj Belgujo DOMON valorantan 18.000 dolarojn, kun MEBLARO en la valoro de 5.000 dolaroj, kaj plie SUMON de 25.000 dolaroj.

Al ĉiu urbo, havanta pli ol 200.000 enloĝantojn, oni estus povinta donaci 30.000.000 da dolaroj por la biblioteko, 30.000.000 da dolaroj por lernejoj kaj pluan 30 milionojn da dolarojn por la malsanulejoj !